

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ huhtikuu ♦ aprilo ♦ 2/2008



*Partoprenantoj de Vintraj Tagoj vizitis i.a. la straton Esperantotie. Artikolo sur paĝo 10.
(Fotis: Teuvo Alavillamo)*

Nova prezidanto sin prezentas, p. 3

**Per Pasporta Servo el Koreio, p. 6 ♦ Muut lehdet, s. 19
Karavano al Roterdamo, Valamo-kursoj, Aŭtunaj Tagoj, p. 17**

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 050 365 0037 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 20 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Börje Eriksson, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

Jukka Laaksonen, Orimuskatu 79 B 4, 33580 Tampere. ☎ (03) 2554 724 ✉ jvaletto@kolumbus.fi

Paula Niinikorpi, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Teuvo Alavillamo, Leväsjoentie 535 C, 29810 Siikainen. ☎ 040 536 9728 ✉ fantomo@jippii.fi

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@kotikone.fi

Vilorg Teräväinen, Kaunisharjunpolku 3 E 61, 15800 Lahti. ☎ (03) 734 3978 ✉ vilorg@elmi.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): Sampo 800017-230825.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>





Nia internacio

Ni esperantistoj trovas memkomprenebla ke ni estas internaciuloj.

Ke povu ekzisti internacieco, devas ekzisti nacieco. Ke povu ekzisti nacio, devas esti kriterioj por tion difini. Al ni finlandaj esperantistoj ĉi tiu jaro estas aparte taŭga cerbumi kaj diskuti pri ambaŭ, internacio kaj nacio: Estas Jaro de Lingvoj proklamita de Unuiĝintaj Nacioj, kaj estas 200 jaroj de la tiel nomata Finnlanda milito, kies sekvo estis disigo de Finnlando el la Sveda reĝno.

Reĝlando Svedio kaj niaj prapatroj en ties orienta parto perdis la militon (en ĉiu milito ĉiu perdas), sed ambaŭ gajnis la pacon (nur paco donas ion por gajni). Svedio, bonŝance, perdis definitive pozicion de grandpotenco, de ”granda aŭ grandioza nacio”, kaj en la oriento aperis eblecoj konstrui nacion.

Antaŭ ducent jaroj literatura finna lingvo ekzistis en Biblio kaj Psalmaro, pri terkulturado oni konsilis en almanakoj, laika beletro apenaŭ burĝonis, kaj administrado tute ne estis popollingva. Ja leĝoj estis tradukitaj, sed ŝtata kaj akademia vivo estis absolute fermita al la (plejparte) finne parolanta plimulto, kiu estis regata amaso kaj tute ne sentis apartenon al komuna lando aŭ “nacio”. Identecon difinis pli proksimaj, tre konkretaj aferoj. Tiun konkretecon donis la naturo kaj la administracio, en kiu simpla kamparano ne estis memstara subjekto, sed nur regato.

Nacion kreis dum la 19-a jarcento la ekonomia evoluo. Ĝin ebligis stabila politika stato. Tiuj – bezonoj de la ekonomio kaj longdaŭra stabileco – necesigis utiligon plejeble amasan kaj efikan de homaj fortoj, sociekonomian kun-

laboron. Klarvidaj kaj progresemaĵ intelektuloj komprenis, ke por doni al homoj justan parton de la progreso estas necese doni taŭgajn ilojn. Komunikiloj estas materiaj – produktado, trafiko, komerco, mono –, intelektaj – lingvo, scio, kono – kaj spiritaj – mempercepto, komuna konscio. Ĉio ĉi kreas nacion. Nacio estas formo de organiziĝo.

Ke homoj organiziĝas kiel nacioj kreas komunecon sed ankaŭ apartecon. Kiuj pri socia, intelekta kaj spirita evoluo progresemas, klarvidas ke la nacia aparteco povas enhavi ankaŭ riskojn. Naciismo direktita kontraŭ aliaj estas fatala risko. Tia nacia pensmaniero estu al ni esperantistoj fremda. Internacieco estas memkomprenebla al ni.

Sed ankaŭ internacia organiziĝo povas krei krom komunecon, ankaŭ apartecon. La terminon “internacia” oni foje uzurpas. Tiu internacio, kiun ni kiel esperantistoj konstruu, estu la internacio de egala komuneco komunika, kultura, intelekta – tio estas nia sulko por fosi, kaj tiu sulko helpas atingi ankaŭ necesan egalan komunecon socian-ekonomian.


Ni plenumu nian komunlingvan lokon en la komuna mondo.

Tuomo Grundström

Nova retadreso al Esperantolehti

Notu bone, ke la redakcejo de Esperantolehti havas novan retadreson. Ni petas tuj ekuzi la novan adreson: eafgazeto@esperanto.fi

La milito, kie ĉiuj venkis



Ĉi tiun jaron pleniĝas 200 jaroj ekde tio, ke Finnlando disiĝis el regno de Svedio. Memore de tio okazis kaj okazos eventoj, kiel preleg-serioj pri la tiamaj okazoj kaj cirkonstancoj. En vintro 1808 komenciĝis milito inter Svedio kaj Rusio, la milito, kiun ni konas per epiteto "la Finnlanda milito", pro kies rezulto Finnlando transiris el Svedio el Rusio. Tion oni nominale agnoskis en la packontrakto farita en aŭtuno 1809.

En oftaj okazoj oni povas diri pri milito, ke neniu gajnas. Armeoj povas dum jaroj batali, post ĉiufanka laciĝo lasi la batalon en situacio, kie restas en saldo amaso da mortintaj viktimoj kaj materiaj detruoj, kaj semoj de hato kaj venĝemo, kiuj povas daŭri tra jarcentoj. La Finnlanda milito tamen estas kazo, kie oni povas en iu senco diri, ke ĉiuj tri koncernitaj landoj gajnis ion.

Formale en la milito ja venkis Rusio. La tuta milito estis daŭra triumfo de la rusa armeo, kiu rapide marŝis tra Finnlando, kiun la sveda armeo nur modeste kaj cedeme defendis. Rusio do gajnis 300 000 kvadratkilometrojn da plia areo, kaj tiel sendube venkis.

Kion gajnis Svedio, estis daŭra paco por sia estonteco. Antaŭ la Finnlanda milito Svedio kaj Rusio dum kelkaj jarcentoj kutimis havi militon almenaŭ unufoje en ĉiu jarcento. Ekzemple en la 18a jarcento ili estis en milito dufoje, sume pli ol du jardekojn. Post la Finnlanda milito Svedio tute ne plu militis kontraŭ Rusio, kaj eĉ kontraŭ aliaj landoj preskaŭ tute ne. Okazis ankoraŭ nur mallonga milito kontraŭ Danio jare 1813, sed post tio ĝis nuntempo Svedio partoprenis nenion militon, kaj povos verŝajne post kvin jaroj festi tutajn du jarcentojn sen iu ajn milito.

Se Svedio ĉe la malvenko de la Finnlanda milito estis eksa granda regno, kiu perdis duonon el sia iama plej vasta amplekso, oni apenaŭ pov-

is antaŭvidi, ke anstataŭ area grandeco ĝi konstruos ion tute alian. Svedio seniĝis pri preskaŭ ĉiuj regionoj, kie la

popolo parolis fremdajn lingvojn (restis nur iom da finnoj kaj sameoj en la norda parto), kaj same ĝi seniĝis pri troaj ambicioj al la orienta direkto. Ankoraŭ Norvegio jare 1814 aneksiĝis al Svedio kaj jare 1905 pace memstrariĝis, sed krom tio oni en Svedio povis koncentriĝi al konstruado de sia propra socio.

Dum sekvaj unu kaj duono da jarcentoj Svedio vidis en sia najbareco du mondmilitojn, revoluciojn, civilajn militojn kaj aliajn malpacajn turnojn sen mem partopreni en iu ajn el ili. Post tio Svedio estis unu el la plej riĉaj landoj en la mondo kaj modela ekzemplo pri stabila demokratio. Se tio estis kaŭzita de la rezulto de la Finnlanda milito, apenaŭ malbona rezulto.

Sed krom la du inter si militintaj landoj estis ankoraŭ tria lando, kiun la Finnlanda milito koncernis – Finnlando mem. Oni povas diri, ke Finnlando tiam gajnis sian tutan ekziston en formo de lando kaj pli posta memstara ŝtato.

Antaŭ la milito Finnlando ne vere estis lando. Ekde tio, ke ia ŝtata strukturo etendiĝis en la regionon de tio, kio nun estas Finnlando, ĝi ĉiam estis parto de Svedio – aŭ, parte, parto de Rusio, depende kie la limo post la lasta paco situis. Difinitajn proprajn limojn ĝi ne havis, kaj ankaŭ ne tiajn administraciajn organojn, kiuj estus entenantaj tutan Finnlandon. La ideo pri aparta Finnlando apud Svedio iel ekzistis, ĉar la svedaj reĝoj jam en la 16a jarcento uzis ankaŭ titolon grandduko de Finnlando, sed tio ĉefe povis esti nur deziro de la monarkoj atingi plian prestiĝon per plia titolo. Esence la regiono estis nur kelkaj

Mapo el jaro 1665 estas ornamita per la grandduklanda emblemo de Finnlando (supre meze) kaj sep provincaj emblemoj.

gubernioj, kiujn administris la sveda oficistaro same kiel aliajn guberniojn.

Estas ofte dirata, ke Finnlando en Svedio estis nur unu provinco de Svedio, sed ankaŭ tio ne ĝustas. Finnlando ja konsistis el pluraj provincoj. En tiutempaj mapoj oni povas vidi nomitaj 6 ĝis 9 provincoj sub la koncepto de grandduklando Finnlando, simbolitaj de siaj propraj provincaj emblemoj apud la duklanda emblemo. Ankaŭ la packontrakto fine de la Finnlanda milito aparte listigis kelkajn el la provincoj, kiujn Svedio devis doni al Rusio, kaj el kiuj oni formis Finnlandon.

En transiro al Rusio oni la unuan fojon fondis tian grandduklandon je nomo Finnlando, kiu havis difinitajn limojn, kie oni kolektis doganon pri importitaj kaj eksportitaj varoj, kaj propran registaron. Tio signifis naskiĝon de Finnlando.

Se oni volas spekulacii pri posta evoluo de Finnlando en kazo, ke ĝi neniam estus transirinta el Svedio al Rusio, oni povas imagi, ke la Finnlanda ŝtato neniam estus naskiĝinta. La sveda lingvo povus esti la ĉefa lingvo de la tuta regiono kaj la finna ekzisti en same marĝena situacio, kiel la karela lingvo en Rusio nun estas. Ĉu do la okazoj por la loĝantaro de Finnlando estintus same feliĉaj kiel por la svedoj, du jarcentoj sen militoj, aŭ ĉu male estus daŭrintaj pliaj militoj ĵetantaj la limon inter Svedio kaj Rusio plue tien kaj reen, estas ne eble diri. Sed en nivelo de landoj oni povas diri, ke la Finnlanda milito almenaŭ en iu senco estis milito, kie du landoj batalis kaj ĉiuj tri venkis.

Mikko Mäkitalo



Esperanto-klubo de Helsinki

La jarkunsido de Esperanto-Klubo de Helsinki okazis la 26-an de februaro en la oficejo. La kunsido elektis daŭre Jukka Pietiläinen kiel prezidanto. Al la estraro estis elektitaj Henry Heinonen, Taneli Huuskonen, Sakari Kauppinen kaj Ritva Sabelli kiel ordinaraj membroj kaj Lauri Mustonen kaj Kristiina Hautamäki kiel vicmembroj. Kiel revizoro estis elektita Irmeli Tanskanen kaj vice Arvo Karvinen. Poste la unua estrarkunsido elektis Sakari Kauppinen kiel vicprezidanto, Ritva Sabelli kiel sekretario kaj Jukka Pietiläinen kiel kasisto. Librotendon prizorgas Paula Niimikorpi.

Helsinki-anoj planas partopreni komunan ekskurson en Lempäälä, sed organizas ankaŭ propran ekskurson al urba naturo la 14-an de junio. Pli da informoj: jukka.p@esperanto.fi aŭ telefone 040 574 8508.

Gastoj el Koreio ŝatis jultempon en Finnlando

Du koreoj, Jeong-uk kaj lia fratino Moran, venis al Finnlando la 21-an de decembro kaj restis tri semajnojn ĉe pluraj finnaj gastigantoj de Pasporta Servo. Intervjuis Jeong-uk-on unu el la gastigantoj, Saliko.

1. De kie venis al via kapo la ideo vojaĝi per Pasporta Servo?

Kiam mi lernis Esperanton, mia esperanta instruisto parolis ofte pri utileco de Esperanto. Li, mia instruisto, parolis al mi diligente ke ”mi kaj kelkaj koreanoj vojaĝis per Pasporta servo” kaj li konsilis iri al UK aŭ vojaĝo per Pasporta servo. En la komenco mi tamen ne akceptis lian konsilon, ĉar mi ne fidis mian esperantan kapablon, sed mi ekfidis mian kapablon pro interparoladoj en UK de Jokohamo.

2. Kiujn landojn vi vizitis kaj kiom longe via vojaĝo daŭris?

Antaŭtempe mi vizitis Tajlandon kaj Japanion, sed tiuj ne ŝuldis al Pasporta Servo. Ĉi tiu vojaĝo estas la plej unua tra Pasporta servo. Dum la vojaĝo mi vizitis Germanion, Finnlandon, kaj Svision. Mi estis 4 tranoktojn en Germanio kaj Svisio kaj pasigis 20 tagnoktojn en Finnlando. (Mi planis, ke ni vojaĝos dum 30 tagoj.)

3. Kiajn diferencojn vi rimarkis inter via hejmlando Koreio kaj Eŭropo?

Mi vojaĝis dum advento, kristnasko. Mi vidis kristarbojn, adventajn cirklojn, aliajn dekoraciojn, eĉ vulgaruloj havas ilin. En Koreio, oni povas vidi ilin nur en kirko, aŭ publika loko. Mi pensas, ke finnoj ŝatas kandelojn. Mi vidis, ke finnoj metis kandelojn antaŭ la pordon de sia domo en novjara tago. Tio estas bela laŭ mi. Koreoj ne bruligas multajn kandelojn. Finnlanda

kaĉo estas tre densa por orientanoj. Min surprizis ankaŭ tio, ke multaj homoj havas saunejon kiel banejon!

4. Ĉu vi rimarkis diferencojn inter Finnlando kaj la aliaj eŭropaj landoj, kiujn vi vizitis?

Finnlanda naturo estas tre larĝa, arbara. Ĉi tio estas tre grava al mi. Mi ne antaŭe vidis tiajn arbarojn, lagojn, klimatojn. Mi povis preĝi kiel Sankta Francisko*. En Finnlando montoj estas malmultaj. La ritmo de finna lingvo estas malsama ol tiu de Indo-Eŭropaj lingvoj. Kiam mi estis en Finnlando, mi vidis tre malmulte da kolorhaŭtaj rasanoj. Infanoj, ludantaj kun amikoj, ĉesis interparoli kaj moviĝi, ĉar ili rigardis nin! Vidi nin evidente estis nekutima sperto al ili, kaj al ni estis nekutima, ke ili tiel atentis nin.

5. Vi pasigis Kristnaskon en Finnlando. Ĉu tio plaĉis al vi?

Kvankam iuj finnoj nomas tiun feston ”julo” (joulu), al ili, aŭ aliaj eŭropanoj, kristnasko estas malnova familia kutimo, sed koreoj ne pensas pri kristonasko kiel pri kutimo. Televido ĉe ni faris kristnaskan atmosferon, sed tio estas nur imitado. En lasta kristonasko, mi starigis, dekoraciis kristarbon kun Mikko, kaj manĝis manĝaĵojn festajn, kio estas laŭ finna kutimo.


6. Kio estis plej malfacila dum via mondvojaĝo? Kaj kio estis amuza?

Mi kaj mia fratino devis kunporti grandajn pakajojn! Mi pensis, ke kiam mi vojaĝos al aliaj landoj, mi devos malgrandigi la pakajojn. Multaj homoj ne komprenis nian anglan parolon pro prononco.

7. Kiel Esperanto helpis vin kaj kiel la angla?

E-aj Samideanoj helpis multfoje! E-o helpis min por memori latinajn vortojn, kompreni ang-

*Mikko (dekstre) kaj
la koreaj gefratoj
apud rivero
Paimionjoki.*



lan gramatikon kaj interparoli kun aliaj E-istoj. Kaj la angla... ĉiuj landanoj konas anglajn vortojn, eĉ publiko kiu ne povas paroli la anglan.

8. *Kion kaj kie vi studas en Koreio?*

Mi loĝis, kaj loĝas en Seulo, kaj mi lernis mikrobiologion en universitato. Ankaŭ mia fratino.

9. *Ĉu vi farus la saman vojaĝon denove, se eblus? Kiajn konsilojn vi donus al homoj, kiuj uzos Pasportan Servon?*

Jes, mi esperas revojaĝi per Pasporta Servo kaj mi jam estas plananta tion. Se iu estus antaŭ mi, mi konsilus tiel ĉi: “NE TIMU! aliaj homoj helpas vin eĉ ne-esperantistoj! RIGARDU

MULTAJN LOKOJN KAJ HOMOJN! eble vi dezirus vidi nur grandajn, famajn... sed vi rigardu normalajn. Vi povus havi neordinarajn spertojn!”

10. *Dankon al vi, Ĝong-uk – ja tiel vi prononcas vian nomon! Estis tre neordinara sperto havi du koreojn kiel gastojn en Finnlando.*

* demandite pri religio la gastoj diris, ke ili estas katolikoj, sed Jeong-uk ĉeestis nian luteranan diservon en Lestijärvi kun surpriza atentemo kaj intereso.

Saliko

En Sankt-Peterburgo

Dum februara semajnfino dek finnlandaj esperantistoj veturis renkonti peterburgajn esperantistojn, kiuj vizitis Helsinkon en 2006. En Peterburgo nin atendis ĉiĉeronino de finna vojaĝ-agentejo. Kun ŝi ni traveturis parton de la vasta urbo per buso por atingi nian hotelon Dostojevski. Survoje ŝi rakontis al ni pri la vidaĵoj sed precipe avertis nin pri malfacilaĵoj, metroo, poŝtelistoj kaj perdo de pasporto.

La hotelo havas komfortajn, modernajn ĉambrojn, restoraciojn, saŭnon, "fitness"-ejon. Ĉio en ĝi ŝajnas eksterlanda, plejparte brita. Vidu retejon www.dostoevsky-hotel.ru, se interesas vin la aspekto. Notu, ke en Peterburgo oni povus uzi ankaŭ avantaĝan hostelon "Base Camp" proksime al la metroa stacio Sportivnaja (www.bchostel.org, *retadreso* info@bchostel.org), kies posedanto posedas ankaŭ Esperanton kaj donas rabaton al esperantistoj!

Hotelo "Dostojevski" situas ĉe la strato Vladimirsky prospekt vid-al-vid de flava katedralo de Vladimira Dipatrino proksime al literatura

kvartalo kun lokoj ligitaj al verkistoj Dostojevski, Nekrasov, Ahmatova. Malantaŭ kaj apud la hotelo situas luksaj modernaj vendejoj en multaj etaĝoj de t.n. Dostojevaska trapasejo. En ili oni ne vidis klientojn, la vendotaĵoj estas multekostaj eksterlandaj modaĵoj. En la trapasejo troveblas ankaŭ kafejoj. Ni vizitis unu, kaj la kelnerinoj estis vestitaj en skote kvadratitaj antaŭtukoj kaj ĉapoj, la teosaketoj havis anglajn nomojn. La multeco de la kuketoj kaj dolĉaĵoj plaĉis al ĉies okuloj sed ne al ĉies monujo.

Vespere peterburga esperantisto Sergej Krajuhin venis gvidi nin al kulturdomo Ŝelgunov, kie situas klubejo komuna al blindaj kaj vidantaj esperantistoj. Laŭ li en Peterburgo oni povus havigi al si esperante-parolantan gvidanton el inter la urbaj ĉiĉeronoj. En la kulturdomo ni unue konatiĝis kun la Blindula Muzeo kaj poste prezentis nin en la apuda E-klubejo. Sekvis riĉa kultura programo: muziko de juna Balalajko-ensemblo, poemo, kantoj, rakonto, plia muziko de altkvalita virina ensemblo "Blua Ponto", kiu



Junaj muzikistoj en la peterburga E-klubo.

ŝatus fari turneon Finnlande. Tenoro Vladimir Kosarev kantis al ni france, angle kaj esperante. La klubanoj regalis nin per teo kaj memfaritaj frandaĵoj.

”Steletto” kaj Esperanto-klubo de Helsinki donacis al peterburga klubo ”Amikaro” terglobon, sur kies surfaco oni povas palpe senti la kontinentojn, montarojn, marbordojn, riverojn, lagojn kaj insulojn de la mondo. ”Palpante ĝin vi imagu, kiel Esperanto disvastiĝis de loko al loko,” diris Heikki Kosonen, etendante la donacon al blinda junulino Anna Fomina. Heikki vizitis la klubejon de la ”Amikaro” jam la trian fojon, lia unua vizito okazis en 1964. Antaŭ ol disiri ni kunkantis kelkajn Esperantajn kantojn, ekzemple ”Vivu la verda stel’, kaj rusajn romanojn.

Dum rondveturado en la urbocentro ni vidis plurajn mirindajn preĝejojn kaj monumentojn, palacojn kaj aliajn konstruaĵojn sed nur de ekstere. Multloke la belaĵoj estas restaŭrataj. Sankt-Peterburgo ja havas 300-jaran historion kiel urbo kaj loĝantaron de pli ol 4 milionoj. Ni aŭdis

pri inundoj, kiujn kaŭzas vento kaj ondoj de la Finnlanda Golfo kaj pri la baraĵo konstruata por ŝirmi la urbon.

Dimanĉe Sergej kunprenis nin al la fortikaĵo de Petro kaj Paŭlo. (Cetere, tiu Sergej estas dekoraciisto kaj pentristo, kiu vendas esperantajn kartojn, afiŝojn, kalendarojn, lia adreso: *skrayukhin@yandex.ru*). Ni vizitis ankaŭ ”Pupmuzeon”, fakte vaksokabineton kun dekoj de famuloj el la rusa pasinto, caroj, carinoj, iliaj idoj, Rasputin, politikistoj, artistoj, verkistoj vestitaj laŭ la modo de sia tempo. Kvankam vintra vetero en Peterburgo estas venta kaj frosta, estis solene stari sur la bordo de glacia Neva-rivero. Tamen oni ne povas nei, ke somere Sankt-Peterburgo kun siaj oraj fontanoj, parkoj kaj lumaj noktoj povas esti pli agrabla kaj alloga.

Saliko

Anna Fomina palpas la terglobon donacitan al ”Amikaro”.



Vintraj Tagoj en etoso de lingvoj kaj 100-jaraj memoroj

La 550-jara Espoo bonvenigis la 51 partoprenantojn al Vintraj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando. La kunveno, hotelo Kuninkaantie, situis apud la mezepoka katedralo de Espoo kaj dum la semajnfino eblis ankaŭ vizito al ĝi. Vintra vetero kun iom da neĝo kaj frostoj surprizis nin en komenco de marto.

La tagoj komenciĝis kiel jam tradicie kun konatiĝa, elementa kurso, kiun ĉi-foje gvidis Tuomo Grundström. La kursanoj ne abundis, tamen gaja kanto sonis en la lernoĉambro inter la klarigo de nia onklo Tomaso.

Post la malfermo estis en la programo du interesaj prelegoj: Jouko Lindstedt prelegis pri Lingvoj minacataj kaj mortontaj kaj Patrik Austin pri Novaĵoj de lingvoinstruado. La publiko havis bone eblecon demandi kaj ricevi respondojn de ambaŭ prelegantoj.

Antaŭ la vespermanĝo okazis la jarkunveno de ELFI kaj kunsido de EAF-estraro. Membroj de Societo Nino Runeberg havis specialan programon anstataŭ la kutima akcepto.

Vespere la partoprenantoj memoris multflanke la pasintan jubilean jaron de EAF kaj konatiĝis kun la jubilea skatolo kaj kun donacoj, kiujn la Asocio ricevis por 100-jariĝo. Taneli Huuskonen kun palindromoj kaj Patrik Austin kun kantoj alportis memoraĵon el la somera festivalo Arta Lumo. Ankaŭ vespere okazis du prelegetoj: Jouko Lindstedt rakontis pri Akademio de Esperanto kaj Päivi Saarinen pri historio de UEA. La venontsomera komuna vojaĝo al UK en Roterdamo estis pritraktita de eblaj karavananoj. Komuna kantado gvidita de Marjo Laine kaj Patrik Austin alportis ĝojan finon por la vespero.

Dimanĉe post la jarkunveno okazis en Espoo interesa rondveturo, kiun gvidis amuze kaj lerte Harri Laine. La rondveturo haltis kompreneble en Esperantotie (Esperantovojo), kie antaŭe

situis la domo de konata esperantisto Vilho Setälä. Ni ankaŭ vidis de ekstere la kongresejon Dipoli de la 54a UK en 1969. La rondveturo finiĝis en urboparto Tapiola en WeeGee-eksponicia centro, kie ni kafumis. Tie okazis la fermo en kunlaboro de ambaŭ prezidantoj: Anna Ritamäki kaj Tuomo Grundström. Post tio la partoprenantoj povis kontente ekkomenci la hejmvoyaĝon. Pri sekvaj Aŭtunaj kaj Vintraj Tagoj decidus baldaŭ la nova estraro de EAF.

[raportis T.O.]



La ĝisnuna prezidanto Anna Ritamäki transdonas la martelon al la nova elektito Tuomo Grundström.



La nova estraro optimisme frontas la nekonatan estontecon. De maldekstre: Taneli Huuskonen, Jukka Laaksonen, Paula Niinikorpi, Tiina Oittinen, Tuomo Grundström, Päivi Saarinen, Börje Eriksson, Vilorg Teräväinen, Teuvo Alavillamo kaj Markku Saastamoinen. (Fotoj: Harri Laine)

La nova estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando

En la jarkunveno dimanĉe la 9-an de marto, 2008 estis elektita por la Asocio nova estraro. Ĝia konsisto por la jaro 2008 estas jena: Prezidanto Tuomo Grundström, Vicprezidanto Päivi Saarinen, Sekretario Tiina Oittinen. Estraranoj: Börje Eriksson, Taneli Huuskonen, Jukka Laaksonen kaj Paula Niinikorpi (nova). Vicestraranoj: Teuvo Alavillamo (nova), Markku Saastamoinen (nova) kaj Vilorg Teräväinen (nova).

Jarkunveno de ELFI

ELFI kunsidis 8.3 en Espoo/Esbo kaj reelektis sian estraron. Nova ideo estis aranĝi konkurson por lingvoinstruistoj, kiuj povas gajni senkoston somerkurson en Valamo. Pli da informoj ili trovos en la maja numero de Tempus. En majo oni ankaŭ trovos la regulojn en la hejmpaĝo de ELFI en la paĝaro de EAF.

Suomen Opettajien Esperantoyhdistys päätti kokouksessaan 8.3. julistaa kieltenopettajille kirjoituskilpailun. Palkintona on ilmainen osallistuminen esperanton kesäkurssiin Valamossa.

ELFI beslöt vid sitt möte den 8.3 utlysa en skrivtävling för språklärarna. Första pris är fritt deltagande i sommarkursen i Valamo.

▷ Foto sur la sekva paĝo.



Akcepto de la Societo Nino Runeberg: Tuomo Grundström, Carola Antskog, Taneli Huuskonen, Maria Runeberg, Harri Laine, Tiina Oittinen, Onni Kauppinen, Anna Ritamäki. (Fotis: Mikaela Runeberg)



Jarkunveno de ELFI. (◁ Artikoleto sur la antaŭa paĝo.)



Raporto pri loka Virina Tago

En Hiroŝima la 8an de marto okazis kunveno de la Internacia Virina Tago de UN ĉe Suda Kultura Halo kun 500 partoprenantoj, kaj ĉiuj ricevis broŝuron de viaj mesaĝoj. Krome, de la 2a ĝis la 9a, marto, ĉe la Urba Virina Eduka Centro okazis ekspozicio de la mesaĝoj, kaj 200 vizitantoj legis interese ĝin sume 157 mesaĝojn el 50 landoj:

el Azio(17): Barato 2/ Ĉinio 3/ Irano 1/ Israelo 3/ Kazahio 1/ Koreio 2/ Nepalo 2/ Pakistano 1/ Uzbekio 2/

el Oceanio(6): Aŭstralio 5/ Novzelando 1/

el Nordameriko(9): Kanado 3/ Usono 6/

el Sudameriko(7): Argentino 2/ Brazilo 2/ Kostariko 1/ Kubo 2/

el Afriko(10): Benino 2/ Ganao 1/ Kongo 1/ Komoro-insuloj 1/ Madagaskaro 1/ Niĝerio 1/ Senegalio 1/ Sudafriko 1/ Togolando 1/

el Eŭropo(108): Albanio 2/ Belgio 5/ Britio 1/ Bulgario 3/ Ĉeĥio 4/ Danio 3/ Finnlando 3/ Francio 33/ Germanio 4/ Hispanio 3/ Islando 3/ Italio 9/ Hungario 5/ Kroacio 1/ Luksemburgio 1/ Malto 1/ Nederlando 4/ Norvegio 2/ Pollando 5/ Rusio 4/ Serbio 5/ Svedio 3/ Svislando 3/ Ukrainio 1.

Danke al vi karaj, mi plu luktas, luktos pli pasie por morgaŭa pli bona mondo.

OSIOKA Taeko, Japanio

Kleriga Tago en UK

La UK estas ankoraŭ for, sed pri diversaj programeroj jam frue necesas pretiĝi.

Jam por la sesa fojo estas organizita Kleriga Tago; ĝi okazos en la kongresa lundo. Se vi planas partopreni la kongreson, ĉu vi emus proponi kontribuon? Profitigi viajn spertojn al la partoprenantoj de la UK? Eblas proponi ne nur movadajn temojn. Povas temi pri lingvoj, informado, interreto, organizado, literaturo, aŭ eĉ pli fantaziaj temoj. Povas esti sub formo de prelegoj, podiaj diskutoj, partoprenigaj programeroj. Ne hezitu proponi tute novajn erojn! Certe inter vi troviĝas novaj movadaj talentoj.

Ĉar kutime en la UK malabundas partoprenigaj programeroj, estas aparte bonvenaj la proponoj pri tia formo de programero, kiu ebligas al la ĉeestantoj esti ne nur ĉeestantoj, sed ankaŭ agantoj.

Viajn proponojn kun plezuro ricevos Michela Lipari <michela.lipari@tiscali.it> kaj mi mem, Claude Nourmont <moonmont@pt.lu> kiuj kunorganizas la tagon.

Anticipan dankon pro via kunlaboro,

Claude Nourmont

Eŭropa referenckadro en Esperanto

Meze de decembro finpretiĝis la Esperanta traduko de grava lingvopedagogia verko de la Konsilio de Eŭropo. Per ĝi Esperanto atingis ankaŭ lingvopolitikan rekonon ĉe eŭropaj instancoj kiel la Konsilio de Eŭropo, ALTE (Asocio de Lingvo-Testistoj en Eŭropo) kaj la DIALANG-projekto de la Eŭropa Komisiono, kiuj bonvenigis kaj aprobis la aperigon de siaj dokumentoj en Esperanto.

La resuma verko “Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado, pritaksado” celas en travidebla kaj kohera maniero subteni lingvolernantojn, lingvouzantojn kaj instruistojn ĉe la difinado kaj atingado de siaj celoj. La ellaboritaj taksosistemoj ebligas unuecan

mezuradon de lingvaj kapabloj, kun travideblo kaj internacieco, kiu faciligos kompari lingvokonojn en diversaj landoj kaj pro tio servas kiel bazo de la ekzamsistemo de UEA-ILEI. La akreditigo de tiu novtipa ekzameno nun okazas ĉe ALTE. Unuaj tiaj ekzamenoj estas planataj por la dua parto de 2008.

La Esperanto-traduko de la Referenckadro baldaŭ listiĝos en la oficiala retejo de la Konsilio de Eŭropo kiel la 26-a versio apud 25 nacilingvaj tradukoj. La traduklaboron financis Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Fondaĵo Saliko subtenis eldonajn kaj organizajn kostojn.

La libro estas elŝutebla el la retejo www.edukado.net kaj multobligebla por nekomercaj celoj. Ĉe la Libroservo de UEA akireblos kontraŭ produktokostoj multobligitaj ekzempleroj, kiuj povas bone servi kiel informmaterialo donacota al bibliotekoj kaj landaj edukinstancoj.

Pli detalaj informoj kaj la elŝutejo ĉe <http://www.edukado.net/pagina/REFERENCKADRO/18364/#19858>

(el komunikado de UEA koncizigis mm)

Virino kandidatos por la literatura Nobelo

La membraro de Esperanta PEN-Centro selektis kvar kandidatojn por la literatura Nobel-premio: Marjorie Boulton, István Nemere, Giorgio Silber, Spomenka Ŝtimec. Inter ili la abonantaro de “Literatura Foiro” elektis unu kiel definitivan kandidaton. La abonantoj rajtis indiki ankaŭ kvinan nomon lauplaĉe, sed neniu utiligis tiun rajton.

Entute balotis 24 abonantoj el 13 landoj en du kontinentoj. Iliaj voĉoj kreis la sekvan klasiĝon: Boulton: ok; Ŝtimec: ses; Nemere kaj Silber: po kvin.

Laŭ la supra, la Esperanta PEN (kiu ricevis formalan invitleteron de la Sveda Akademio) proponos por 2008 la nomon de Marjorie Boulton, se ŝi konsentos.

(el HeKo prenis mm)

Buller esploris pri UK en Kubo

Osmo Buller, la ĝenerala direktoro de UEA, vizitis Kubon de la 2-a ĝis la 9-a de februaro laŭ invito de Kuba Esperanto-Asocio por esplori la kondiĉojn por okazigi la Universalan Kongreson de Esperanto en Havano en la jaro 2010. Dum la vizitoj al unuopaj lokoj Buller estis akompanata de estraranoj de Kuba Esperanto-Asocio. Buller ankaŭ kunsidis kun praktike la tuta estraro de KEA dufoje en la bela sidejo de la Asocio.

Ĵaŭdon, la 7-an de februaro, okazis en la teatro de la Nacia Biblioteko Jose' Marti' simpozio pri la 100-jariĝo de UEA, kun partopreno de ĉ. 100-kapa publiko. La festparolanto estis Osmo Buller, kiu laŭdis la simpozion kiel "eble la unuan grandan aranĝon omaĝe al la jubileo de UEA".

el komunikado de UEA koncizigis mm

"Vojaĝo" denove la plej furora

Per "Vojaĝo en Esperanto-lando" akademiano Boris Kolker fariĝis ĉampiono de la Esperanta libromarkato ankaŭ en la jaro 2007. Lia perfektiga kurso, kiu samtempe estas enkonduko en la Esperanto-kulturon, gajnis la unuan lokon jam en la sesa sinsekva jaro, kio ne sukcesis al alia libro dum tiuj pli ol 30 jaroj, dum kiuj la Libroservo de UEA aperigis furorlistojn de siaj vendoj. Ekde 2002 vendiĝis sume 2568 ekz. de la libro de Kolker.

La reeldono de "Vivo de Zamenhof" de Edmond Privat en redakto de Ulrich Lins, kvankam aĉetebla nur ekde aŭgusto, atingis la trian lokon. Tre sukcesan lanĉon spertis la lernolibro de Stano Marĉek, "Esperanto per rekta metodo". Ĝi aperis ankaŭ en multaj aliaj lingvoj, el kiuj la japana eldono, evidente dank' al la vendado en la UK, sukcesis eniri la liston de totalaj vendoj.

La vendoj sumiĝis je 121 172 eŭroj. Kompare kun la bona jaro 2006 okazis malkresko de 12 747 eŭroj pro la tradicie malpli bona debito de la kongresa libroservo, kiam UK okazas ekster Eŭropo. La Libroservo de UEA vendis entute 2214 diversajn titolojn. Nur de 84 el ili estis venditaj pli ol 10 ekzempleroj.

- 295 "Vojaĝo en Esperanto-lando", B. Kolker * (EUR 18,00)
- 276 "Pasporta Servo", listo de gastigantoj * (EUR 15,00)
- 245 "Vivo de Zamenhof", E. Privat * (EUR 9,00)
- 232 "Lingvo kaj popolo", H. Tonkin * (EUR 14,10)
- 179 "Esperanto per rekta metodo", S. Marĉek (EUR 8,10)
- 138 "Afero de espero", H. Goes * (EUR 9,00)
- 137 "Saluton!", A. Childs-Mee * (EUR 10,80)
- 113 "Internacia Kongresa Universitato 2007", red. A. Wandel * (EUR 12,00)
- 111 "Esperanto elektronike", komputila dvd (EUR 9,00)
- 109 "Gerda malaperis!", C. Piron (EUR 5,70)
- 99 "La Komuna Eŭropa Referenckadro", div. aŭtoroj * (EUR 3,00)
- 99 "Vikipedio – praktika manlibro", red. Y. Nevelsteen (EUR 3,00)
- 90 "Historio por malfermi estontecon", div. aŭtoroj (EUR 15,00)
- 89 "Pocket Esperanto Dictionary", A. McLinen * (EUR 15,00)
- 84 "Mil unuaj vortoj en Esperanto", H. Amery (EUR 12,00)
- 74 "Tyokusetuhou de manabu esuperanto nyuumon", S. Marĉek (EUR 7,50)
- 73 "Plena manlibro de Esperanta gramatiko", B. Wennergren (EUR 27,00)
- 72 "Japanio kalejdoskope", div. aŭtoroj (EUR 5,40)
- 66 "Faktoj kaj fantazioj", M. Boulton * (EUR 13,80)
- 55 "Konciza etimologia vortaro", A. Cherpillod * (EUR 21,60)

